

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

### Enhavo

- |  |    |
|--|----|
| ✓ Tra Brazilo per Esperanto<br>Marta Alonso            | 3  |
| ✓ Gratulojn, samideano Lamas!<br>La Redaktoro          | 5  |
| ✓ Esperanto ĉiam pli prestiĝa<br>La Redaktoro          | 6  |
| ✓ Ĉu oni propagandas nin?<br>La Redaktoro              | 7  |
| ✓ Konkurso pri Belarto por Infanoj<br>La Redaktoro     | 8  |
| ✓ Renkontiĝo en la kampadejo La Laguna<br>La Redaktoro | 9  |
| ✓ Kvar E-stratoj en la sama urbo<br>Interredaktore     | 10 |
| ✓ Sciu   | 11 |

... kaj pli!



## Estimataj:


Ŝajne tuj, kiam oni sukcesas ĝuste endatigi nian bultenon, aperas novaj problemoj en la presejo... kaj denove ni devas demarŝi.

La jarfina numero tradicie devas esti enmanigita iom pli frue ol la antaŭaj, pro tio ke ĉio, kion oni planas por la jarfino riskas aperi venontjare (en nia kazo temas pri apero venontjarmila, imagu!). Do, eble kelkaj gravaj aranĝoj kaj informoj aperos poste.



Via Redaktoro,  
Lic. Alberto García Fumero

**Nia Kovrilo: Nacia Renkontiĝo en Baracoa.**



XII-a jaro, nro. 2 3/2000. (sep.-dec.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etcusa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Alberto García Fumero / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

## NACIA ESTRARO

\***Maritza Gutiérrez González**  
Prez. Atentas plenumon de  
ĉiuj taskoj kaj fakoj.

\***Juan Ramón Rodríguez Gómez**  
Generala Sekr. Kontrolas  
internan agadon./Historio, Ameriko,  
**Avanco, La Noktuo kaj Universo**

\***Martha Alonso Gutiérrez**  
Financoj./Libroservo

\***Alberto García Fumero**  
Informado./Hejmpaĝo

\***Pedro Fernández Rodríguez**  
Kulturo. Zorgas pri artaj k.  
klerigaj aranĝoj./Biblioteko

\***Héctor Jiménez Batista**  
Instruado k. ILEI-Sekcio.

\***Manuel Rodríguez Rábago**  
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj

\***Roberto Torres Alvarez**  
Atento al alilandaj e-istoj.

\***Juan Lázaro Besada Toledo**  
Atento al verkistoj.

\***Carmen A. Hernández Socarrás**  
Faka Agado

Alberto Rodríguez Pineda  
Administrado

## Tra Brazilo Per Esperanto: pli ol 10 000 kilometroj...

La 7-a de julio estas por mi neforgesebla dato. En tiu tago komenciĝis por mi nekredebla, sed treege agrabla aventuro...

Post 9-hora flugo mi alteriĝis en Brazilo. Akompanis min dum pluraj horoj la rivero Amazonio, longa, larĝa kaj kaprica. Jamaikon mi ankaŭ vidis el la aviadilo: la montoĉenoj aperis kvazaŭ verda littuko.

Sankta-Paŭlo, desupre rigardata, estas grandioza spektaklo; milionojn da lumetoj mi vidis. Poste mi sciis, ke en la urbo loĝas pli ol 11 milionoj da homoj. Ĝi estas la plej granda industria urbo de Brazilo.

En la flughaveno longa koridoro atendis min. Nu, kion fari? Mi ne konas la portugalan... Bonŝance fine de la koridoro atendis min S-ro James Rezende, elstara brazila esperantisto. De tiu momento, Esperanto akompanis min, kaj ĉio iris glate.

James akompanis min ĝis Campinas, la unua urbo en Brazilo, kiun mi vizitis. Tie mi loĝis hejme de Anita kaj Fabio, bonegaj amikoj. Mi devas diri, ke mi ankaŭ konatiĝis kun multaj esperantistoj tie, ĉiuj agrablaj kaj simpatiaj.

En Campinas mi vizitis la universitaton Unicamp. Tie laboras Anita kaj Lunazzi. La universitato estas granda konstruaĵo, kiu multe similas al nia teknika universitato ISPJAE.

Kune kun Anita kaj sia plej juna filo mi vizitis belan monumenton dediĉitan al la Majstro,



kiu situas en la placo «Zamenhof», kaj multajn aliajn vidindaĵojn. Ah! kaj en Campinas mi konatiĝis ankaŭ kun la tradicia brazila manĝaĵo «fejoada», kiun oni prononcas «feĉoada».

La tempo pasis tre rapide, kaj poste mi vojaĝis al Ribeirao Preto, kie ankaŭ multaj agrablaj surprizoj atendis min. De tie, mi komencis vojaĝon tra preskaŭ tuta Brazilo, danke al Esperanto kaj al neforgeseblaj amikoj.

**Marta Alonso**  
*Estraranino pri Financoj*

### **Nacia Renkontiĝo en Baracoa**



Omaĝe al la tago de la Majstro, oni okazigis dum tri tagoj Nacian Renkontiĝon en la urbo Baracoa, la plej malnova kaj orienta de nia lando.

Se juĝi per la foto (antaŭ la statuo de Kristoforo Kolumbo), la aranĝo estis ege sukcesa... ĉu Vi ne samopinias?



# Gratulojn, samideano Lamas!

Dum kunsido nia Ĝenerala Sekretario enmanigis al Via Redaktoro la ĉi-suban eltondajon el la periodaĵo «Invasor» el la provinco Ciego de Avila, kun dato 15-an de julio 2000. Kaj jen! Agrabia surprizo! Oni skribas pri nia samideano S-ro Pedro Pablo Lamas, Honora membro de UEA, kiu ĵus ricevis diplomon «Arnaldo Aguilar Cousso» pro lia kontribuo al la kulturo en la provinco.

La ĵurnalisto rakontis pri la iam ĉiusemajnaj leteroj el Lamas, ĉiam «terure» sed bonkore kritikantaj erarojn kaj misinformojn aperintajn en la gazeto, kaj lia senlaca batalo por la plialtigo de la kultura nivelo.

Krom sufiĉe detaŭla kaj simpativaka biografio de Lamas, la artikolo mencias la fakton, ke li estas membro-fondinto de Kuba Esperanto-Asocio, lian Honoran Membrecon ĉe UEA kaj liajn nuntempajn esplorojn pri edukaj kaj kulturaj aferoj.

La «4-foje Avilano» S-ro Lamas (naskiĝinta en strato, municipo, urbo kaj provinco Ciego de Avila) meritis tutan paĝon en la ĵurnalo.

Oni admire komparas lin kun kultura Donkiĥoto - tiuj bezonataj Donkiĥotoj! - kaj prezentas lin kiel ekzemplon.

**La Redaktoro**

P. P. Lamas

## POZITA INKONDITIONALITA E INSOBORNABITE

Por JOSE AURELIO PAZ, con foto del autor

**C**on la kuraĝo de la ĉi-foje avilano Pedro Pablo Lamas, kiu estas honora membro de UEA, oni povas diri ke li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.



Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco. Li estas unu de la ĉi-foje avilanoj kiuj, kun siaj artikoloj, leteroj kaj komentarioj, kontribuas al la kultura nivelo de la provinco.

## Esperanto ĉiam pli prestiĝa

Ni esperantistoj kelkfoje tendencas rigardi esperanton nur el nia persona kaj kompreneble «konvinkita» vidpunkto. Sed kio al ni aperas tiel klare komprenebla, ne ĉiam aperas same al la «ekstera» mondo, kie regas ne nur nescio kaj miskompreno pri la internacia lingvo kaj ĝia rolo en senpera komunikado paca inter la homoj, sed ankaŭ la ideo, ke ĝi eble bone funkcias teorie, sed... sed... sed... multe da sed-oj.



Kelkaj simpatie esprimas la deziron, ke la registaroj aŭ iu nedefinita «iu» faru «ion» pri Esperanto. Tiel oni povus savi nin de kvazaŭdinosaura malapero...

Sed... (nun mia sed-o!) la du sekvaj novaĵoj montros al Vi kaj agrablan kaj surprizan pritakson de Esperanto flanke de la «ekstera» mondo.

### *La Redaktoro*

#### **Ricevita el Interredaktore**

Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino  
Gazetara Komunikado, 2000-12-04

Internacia Asocio de Profesoroj akceptas AIS

=====


IAUPL, la Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj, konfirmis la akcepton de AIS kiel membro.

La akcepto okazis dum la aŭtuna IAUPL-kunveno en Parizo, kie AIS kontribuis per referaĵo pri la situacio de virtualaj universitatoj, kaj signifas gravan rekonon de AIS ekster Esperantujo, ĉar IAUPL estas renoma asocio en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Tiun sukceson AIS dankas nelaste al la persona reputacio de kelkaj el siaj anoj.


AIS finos la jaron 2000 per studadsesio kadre de la Internacia Festivalo (IF) en Treviro (Germanio).

**Reinhard Fössmaier**  
**Informofico de AIS**

<http://www.ais-sanmarino.org/>  
(nova TTT-adreso!)



## Ĉu oni propagandas nin?



Lastatempe en nia lando oni komencis per televide instrui kaj la hispanan kaj la anglan, kadre de plano celanta pliklerigi la homojn. Dum la lasta semajno oni dufoje menciis Esperanto-n... (denove tute libervole, sen ia ajn interveno nia, ni juras...)


Ŝercojn for, jen la informo:

Okazis, ke unu el la temoj de la hispanlingva kurso estis la homa interkomunikado, kaj kelkaj homoj perletere demandis al la gvidantino de la kurso pri la rolo de Internacia Lingvo kiel Esperanto tiucele.

Tiu unua fojo ŝi donis ĝeneralajn informojn pri Eo, ties origino, ties celoj, kreinto, ktp. kaj menciis, ke ekzistas asocio en Kubo. Ŝi eĉ opiniis, ke eble estus bona ideo inviti estonte al reprezentanto de la asocio por paroli pri la afero «Esperanto».

Estas kutimo en tiuj programoj prezenti informerojn pri aferoj rilataj al ĝenerala kulturo. Kaj tie, lastvendrede oni ankaŭ sciigis, kial Esperanto portas tian nomon.

**Alberto García Fumero**  
**Sekretario pri Informado**



## **Konkurso de Belarto por Infanoj kaj Junuloj «Kiel mi vidas mian landon»**

Meksika Esperanto-Federacio invitas ĉiujn infanojn kaj gejunulojn (Esperantistoj kaj gefiloj de Esperantistoj) partopreni konkurson pri desegnado kaj pentrado, okaze de la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, realigota en Meksikurbo de la 15-a ĝis la 21-a de aprilo 2001.

La interesitoj povas partopreni per desegnaĵo aŭ pentraĵo laŭ kiu ajn tekniko, ne tridimensia, en mezuro maksimume 40x55 cm, en unu el la tri sekvaj kategorioj:

- a) 4- ĝis 9-jaruloj
- b) 10- ĝis 14-jaruloj
- c) 15- ĝis 18-jaruloj

La konkursa temo estas «Kiel mi vidas mian landon».

Dorse de la verko devos esti klare notitaj la sekvaj informoj: kompleta nomo de la aŭtoro, adreso, naskiĝdato, titolo kaj tekniko.

La konkursaĵon oni sendu volvita, ne faldita, al la sekva adreso:

Meksika Esperanto-Federacio  
Relaciones exteriores No. 24  
Colonia Federal MX-15700  
México, D.F.

La konkursaĵoj estos akceptataj ĝis la 5-a de marto, 2001. Estos aljuĝitaj po unu premio al la tri kategorioj a, b kaj c; tiu premio konsistos el meksika artaĵo.

Cetere, estos aljuĝitaj du premioj «Honora Mencio» en ĉiu kategorio.

Ĉiu konkursaĵo fariĝos parto el la kolekto de MEF.

Ni esperas kalkuli je via entuziasma partopreno!

Leonora González, specialaj eventoj, 5-a TAKE  
mellamanlola@yahoo.com.mx



RAEK 2000:



## Nacia Renkontiĝo pri Apliko de Esperanto en la Komunumo



De la 16-a ĝis la 19-a de novembro en Camagüey

Dum RAEK estis prelegoj, ronda tablo, kulturaj aranĝoj, seminario, babilado... do jen nova sukceso je tiu provinca filio!

## Renkontiĝo en la kampadejo «La Laguna»

De la 27-a ĝis la 29 de oktobro okazis Nacia Renkontiĝo en la kampadejo «La Laguna», kun partopreno de esperantistoj el Havano, Urbo Havo, Matanzas, Sancti Spiritus, Camaguey, Granma, Santiago de Cuba kaj la Insulo de la Junularo. Ankaŭ la amiko Vilhelmo Lutermano, jam delonge konata de la kuba esperantistaro.



Dum la renkontiĝo eblis partopreni seminarion, konkursojn pri deklamado kaj pri esperantaj, lotumadon kaj eĉ surgrimpi monton!



## 4 E-stratoj en la sama urbo!



(Ricevita el Interredaktore)

Laŭ decido de la Urba Konsilantaro en Gliwice, post la propono de loka Filio de PEA, la 29-an de junio 2000 oni decidis nomi du novajn stratojn en la kvartalo "Pacdefendantoj" per la nomoj:

- \* Antoni Grabowski
- \* Odo Bujwid.

Post la ekzistantaj ĝis nun jam du Esperantaj stratoj: str. L. Zamenhof kaj str. Esperantystow /Esperantistoj/. Gliwice estas laŭ niaj informoj la unua en la mondo urbo kiu havas kvar stratojn ligitajn kun Esperanto-movado aŭ esperantistoj.

Antoni Grabowski. 1857-1921

En la Esperanta mondo konata kiel "patro de Esperanta poezio". Laŭ la Esperantaj historiistoj inter Grabowski kaj Zamenhof okazis la unua interparolo en Esperanto en la jaro 1887. Granda poligloto. Lia traduko de "Sinjoro Tadeo" el pola lingvo laŭ spertuloj estas perfekta. Li tradukis ankaŭ verkojn de Puŝkin, Goethe, Sienkiewi<sup>^</sup>c, Prus, Fredro kaj aliaj.

Fama sciencisto-kemiisto. Ekde 1908 prezidanto de Pola E-Societo kaj ano de la Akademio de Esperanto.

Bujwid Odo. 1857-1942

Kuracisto. Bakteriologo. Profesoro de Jagiellona Universitato en Krakovo. Pioniro en Pollando de vakcinoj kontraŭ rabio. Li fondis en Krakovo Pasteuran Instituton.

En la jaro 1912 li estis prezidanto de LKK-o por la VIII-a UK-o en Krakovo. Post la I-a mondmilito estis elektita kiel prezidanto de Tutpollanda Federacio de E-organizajoj. En la jaro 1931 denove prezidis LKK-on por la XXIII-a UK-o en Krakovo. Li ankaŭ dediĉis multe da tempo por sociaj laboroj.

Vojaĝis ofte pro sciencaj aferoj, kaj ĉie kontaktiĝis kun esperantistoj. Li estis unu el la plej konataj polaj esperantistoj. Honora membro de UEA.



Sekve de peto ricevita el Interreto ( Ksmesperanto@aol.com ), ni aperigas la suban informon pri Koresponda Servo Mondskala:

"Koresponda Servo Mondskala" estas sendependa servo de UEA (legu la paĝon 32 en la jarlibro 2000).

Ĝia celo estas havigi al esperantistoj adresojn de homoj, kiuj deziras korespondi kun aliaj esperantistoj en la tuta mondo.

Gravas por la novuloj uzi la internacian lingvon tra reto da geamikoj, interŝanĝi ideojn, malkovri aliajn vivmanierojn, ktp...

Mi petas, ke vi bonvolu informi la legantojn de via loka aŭ nacia revuo, pri la ebleco uzi tiun servon. Por trovi informojn aŭ argumentojn, bonvolu viziti la hejmpaĝojn ĉe la jena adreso:



<http://www.multimania.com/kosomo>

40 paĝoj per 6 lingvoj donos al vi detalojn pri la funkciado de "Koresponda Servo Mondskala" por helpi al vi redakti artikolon.

Eventuale, bonvolu sendi al mi tiun artikolon perrete aŭ perpoŝte.

Mi antaŭdankas vin.

## Korespondi deziras...



## MalPIVe...

# Humure

Mia najbaro, eterna komencanto, neniam kapabias kongrui sian interpreton de la plej oftaj vortoj, kun la «oficiala» interpreto. Tio ŝuldiĝas unue al lia malfacilo disdividi la radikojn kaj due al iom erarvaga, ekstravaganca penso. Kelkfoje mi pensas, ke li iel mense glitas. Eble pro tio li insistas pri interpreto de *komputero* kiel nura ero, parto de komputo, kaj pri *meblo* kiel ebla apero de la litero m.

Mi ĉi-sube listigas kelkajn el liaj plej sukplenaĵaj difinoj:

Aŭto/mato: mato por kuŝigi aŭtojn.

Bar/emo: emo bari. Sinteno propra je burokratoj.

Di/fino: morto, malapero de diaĵo.

E/fiki: preferi ne tro pensi...

Fen/estro: estro de feno.

Fer/vora: tiu, kiu voras feron.

Grat/ulo: homo, kiu gratas.

Hor/oro: oro, iel ligita al la tempodaŭro de unu horo.

Komput/oro: oro, kiun oni eltrovas post zorga komputado.

Kot/izi: kovri per koto (vd. katod/izi).

Kuk/urbo: urbo, kie svarmas kukoj. Kuklando.

Maĉ/eto: malgranda maĉo, kiel ekzemple tiu farata de eta ronĝulo.


Maŝ/ino: ino, kiun oni maŝas.

Sid/ejo: loko, kie oni kutime sidas, ekzemple por babilado.

Uz/ino: ino, kiun oni uzas por difinita celo.



## Trilingve oni kantis...



Vlad (centre, kun blanka pulovero)

Normale oni pensas, ke en Siberio estas nur ursoj kaj frosto, sed ankaŭ estas esperantistoj, kiel humure klarigis Vladimir Schevenjov (Vlad), rusa Yumeihoisto kiu ĵus vizitis nian landon, kaj kiun oni akceptis en la Nacia Sidejo la 11-an de novembro.

La aranĝo kutima fariĝis nekutima je tio, ke ne nur esperante, sed ankaŭ hispane kaj ruse oni kantis. Post la esperantlingva gitarumado de la vizitanto kaj de la kubanoj, komencantino improvize deklamis en la hispana kaj Vlad kaj Ludmila (el la Centra Havana Filio) kantis rusajn popolkantojn.

Surprizo estis, ke la estrarano pri instruado, Héctor Jiménez, ankaŭ ruse kantis, rememorante siajn studentajn jarojn en Sovetunio.

## Kubaj renkontiĝoj

La 7-an de novembro, 2000 mi venis al la II-a tutmonda renkontiĝo de Amikeco kaj Solidareco kun Kubo laŭ invito de la registaro de tiu ĉi lando. Sed la ĉefa kialo de mia vizito estis deziro persone konatiĝi kun kubaj yumeihistoj, kies laboro jam delonge altiras nian atenton.

En la flughaveno José Martí nian delegacion renkontis reprezentantoj de la ambasadejo, kiuj akompanis nin al la hotelo, kien iom poste alvenis niaj kolegoj.

Sincere dirante, mi iom maltrankviliĝis antaŭ tiu ĉi renkontiĝo. Temas pri alia popolo, pri aliaj tradicioj, preskaŭ pri alia parto de la mondo. Sed la bonvolo de ordinaraj homoj kaj komuna lingvo – Esperanto, rompis ĉiujn barojn kaj timojn. Mi forte ĉirkaŭbrakis Franciscan, lian edzinon Maria kaj ilian filon Fráncel (kiu estas preskaŭ samaĝa kun mi) kiel malnovajn bonajn amikojn.

Tiu ĉi inteligenta familio invitis min loĝi ĉe ili kaj vespere ni havis solenan vespermanĝon. Sonis tostoj je la amikeco inter popoloj, je Esperanto, je Yumeiho.

La sekvantan tagon ni laboris kune. Ili akceptis pacientojn, donis konsultojn. Francisco Briel prezentis al mi sian bibliotekon de rentgenogramoj – la rezulton de kuracado de skoliozo kaj la statistikon de la laboro. Mi kopiis kelkajn rentgenogramojn por la uzado en la laboro kaj por prezentado al kolegoj en Interreto.

Mi prezentis tri el niaj laboroj – pri la kuracado de malsano de Pertes, pri la patologio de novnaskitoj kaj pri sakro-iliakaj problemoj ĉe gravedulinoj.

Pri la maniero de plenumado de la metodo ebligas diri, ke Francisco kaj Fráncel estas adeptoj de pura Yumeiho. Kaj ia ajn aldono ne rompas la harmoniecon de la sistemo kaj ne anstataŭas la bazajn movojn. Indas diri bonajn vortojn pri ilia instruisto – sinjoro Golam Reza.

Mi rimarkis, ke la pacientoj en Kubo estas malpli streĉitaj kaj pli moviĝemaj ol en Siberio. Verŝajne tio ĉi estas ligita al tio, ke en Kubo ne estas tia frostoj kiel en Siberio kaj oni ne portas pezan vintran veston, kio kondukas al fizika kaj psika trostreĉiĝo.

Francisco kaj Fráncel konatigis min kun la loka polikliniko kaj la kliniko de netradicia medicino. Ekzistas statistiko, ke en Kubo naskiĝokvanto estas pli alta ol en Usono kaj estas la plej malalta infana morteco, kaj meza vivdaŭro estas pli alta ol en Rusio.

Krome mi rimarkis, ke niaj kolegoj estas bone konataj inter la kuracistoj en tiuj ĉi klinikoj. Francisco rakontis al mi ke oficialigi la societon nuntempe ne eblas, kaj krome ekzistas bezono je oficialaj kontaktoj, je disponigo de ekonomia helpo al estonta KYS.

Post longa pridiskuto ni konkludis, ke la plej racia decido estos fondiĝo de kuba sekcio ĉe SYS. Ni proponis fari interŝanĝon de specialistoj por la provlaboro. Nun ni jam preparis specialajn matracojn por masaĝo, kiuj estas ellaborataj sur la bazo de nia kliniko. Ankaŭ ni pretas disponigi iun medicinan instalaĵon.

Krome estis proponita komuna protokolo por la gvidado de komuna statistiko, scienca prilaboro de informo. Laŭ deziro kuba sekcio povas fariĝi memstara.

Neforgesebla estis la renkontiĝo kun kubaj esperantistoj. La renkontiĝo ĉe KEA estis nelonga (ĉirkaŭ du horoj) kaj pasis kvazaŭ dum unu elspiro. Mi rakontis pri la Esperantomovado en Krasnojarsk, pri la temoj pridiskutitaj ĉe la II-a tutmonda renkontiĝo. Sonis versoj kaj kantoj en Esperanto, hispana, rusa lingvoj. Precipe al mi plaĉis la kanto "Lasu la malĝojon flugi". Mi opinias, ke tiu ĉi kanto vaste disvastiĝos inter niaj esperantistoj. Ni interŝanĝis adresojn, kaj la membroj de la Asocio donacis al mi du kasedojn kun kantoj de kubaj esperantistoj.


La 13-an de novembro mi kun la internacia delegacio vizitis la hospitalon en Tarará, kie oni kuracas infanojn el Ĉernobilo. La laboro de kubaj kuracistoj multe impresis min. Mi proponis al la ĉefkuracisto de la hospitalo s-ro Julio Medina de Armas, programon de kunlaboro. Kiel direktoro de la kliniko "Sakura" kaj prezidanto de SYS mi proponis senpagan helpon, kiel laboro de grupo de yumeihistoj-rehabilitistoj kaj de profesoro-ortopediisto dum 2-3 semajnoj.

La 14-an de novembro mi adiaŭis al la bonanima familio de Francisco Briel. Lia edzino María diris, ke nun mi havas duan panjon en Kubo (do, kun Francel ni estas kiel fratoj), ni havas multe da komuna, inkluzive Yumeihon kaj Esperanton.

Post 15 horoj mi jam estis en Moskvo.

... Kaj Kubon kun ĝiaj oceano kaj palmoj mi vidas en sonĝo preskaŭ ĉiun nokton.

**Vlad Schevenjkov**



## La Angulo de la Duboj

**Taŭga, konvena, adekvata...** kia devas mi taksi ion, ĉu ĉio, ĉu solvo, ĉu vesto? Ekzemple: ĉu la ĉemizo, kiun mi deziras porti dum difinita aranĝo, estas **adekvata**? Ĉu eble oni devus taksi ĝin **konvena** por la afero?



Tia ĉi lernis mi ĉiun amantan **PIV**-on (onidire baldaŭ estos nova kaj pli ampleksigita eldono!) kaj provis trovi solvon al la kaprompo.

Unue mi serĉis la signifon de **konvena**. Kaj jen surprizo:

**Konvena**: tia, ke ĝi konvenas. Pa! Tio ne utilas... prefere mi serĉu la signifon de **konveni**. **Konveni** esti konforma al tio, kion postulas la situacio, la reguloj, la moroj. Brave! Jen bona difino por mia povra ĉemizo... sed kio pri **adekvata**? Jen: 1) klare kaj tute ampleksanta ĉiujn karakterojn de la objekto (ekzemple: adekvata difino). 2) Ĝuste konforma al la cirkonstancoj. Bonege... ĝis nun, restas preferinda la vorton **konvena** en mia kazo.

Sed tuj diableto tentis min: kio pri **taŭga**? Uf, denove preni la vortaregon... jen **taŭgi**: 1) esti bona por io, uzebla por la celo (nu, bone, ĝi ja estas uzebla, kio do?). 2) Havi ian valoron, povi esti uzata. Ve al mi! Ĉu mi perdos la fidon al **PIV**? Mi pluesploros...

Laŭ **PIV**, **taŭgeco** estas ideo pli vasta ol **konveneco**: konveni insistis pri ĝusta adaptiĝo de io al ĝia speciala uzo; taŭgi rilatas al ĉiuj ĝiaj uzoj.

Kaj finfine solvo al mia problemo: la ĉemizo estas konvena por la aranĝo.

**PIVulo**

Kuba Esperanto-Asocio deziras al Vi

**Feltonoj kaj Prosperon  
en la venonta Jarmilo**



